**Dervisho kaj la Morto, La** Meoa Selimoviá Sarajevo, 1990. 310p. 20cm. Trans. R. Imbert. Famous novel. WAS £23.80 NOW £13.00

**Deveno de Esperanto, La** G. Mattos Chapeco, 1987. 105p. 21cm. A study of the principles used by Zamenhof in the creation of Esp. Was £6.70 NOW £4.50

**Dresado de la Megero, La** W. Shakespeare Rotterdam, 1988. 136p. 21cm. Trans. G.C. Jervis. WAS £5.80 Now £4.00

**Please add 15% for post & packing. Minimum £1.00. Orders over £45 post free. Strictly payment with order to EAB, 201 Felixstowe Road, IPSWICH. IP3 9BJ.**

**Tel. 01473 727 221. Before ordering it may be advisable to contact the office to check continued availability.**

**Calendar of Events.**

April 28 South Midlands Federation Spring Meeting, Watford. ( see Update 10)

May 4 to 7. Scottish Esperanto Association Congress, Motherwell, near Glasgow.

May 18 to 20. SATEB weekend at Wedgwood Memorial College.

May 25-27 Beginners' weekend course at Wedgwood Memorial College.(More details from EAB)

May 28 – June 4. Internacia Junulara Turisma Semajno, Szczawnica, Poland. (leaflet available from EAB office). Note. Polish is not so hard to pronounce if you know the rules, such as 'sz' = sh, "cz = ch, "w" = v. So Szczawnica is pronounced Sh-chavnitsa.

June 2 to 4. French Esperanto Congress, Limoges. (see article in this issue)

July 6 to 15. 37<sup>th</sup> Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-37). This famous, large scale holiday survives the fall of the Soviet Union. This year it takes place in Kaunas, Lithuania. A leaflet is available from EAB office.

July 14-21. 15a Ekumena Kongreso, (54a de IKUE & 51a de KELI) Zagreb. Details from Marija Bełosevich, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb.

July 21-28 86<sup>th</sup> World Esperanto Congress, Zagreb, Croatia. Ask office for leaflet

July 29 – Aug. 5. 57<sup>th</sup> International Youth Congress, Strasbourg, France.

August 11 to 17 41<sup>st</sup> Esperanto Summer School at Wedgwood Memorial College.  
(see article this page).

September 1-10. 35<sup>th</sup> International Holiday. In Spa town of Kudowa Zdroj in south west Poland. Cost £100. Suitable for beginners. See the EAB holiday leaflet.

September 22-23. Scottish Study Weekend at Dunblane. 2001. Contact Jean Bisset.

November 13<sup>th</sup> Nordfranca Europa Esperanto-Rendevuo at Morbecque. (a group from Eastern region usually go to this. There may be some spare places.

December 27-January 3 or 4. 18<sup>th</sup> Internacia Festivalo. Magdeburg, Germany. A very good New year event. Ask EAB office for more details.

*Paciente:* "Mia skribado fariĝas pli kaj pli malbela."

*Kuracisto:* "Vi drinkas tro multe: se vi fariĝos abstinenculo, via skribado plibeligiĝos."

*Paciente (post pensado):* "Mi aĉetos skribmašinon."

## **96a Skota Kongreso de Esperanto, Motherwell, Skotlando, 2001**

Motherwell, la elektita loko, por la Skota Kongreso de la 4a ĝis la 7a de majo 2001, antaŭe estis ĉe la centro de la skota ŝtalindustrio kaj mondfama pro peza inĝenierarado. La industria bazo nun estas multe pli variigita; kaj la urbo situas sur la rando de la kamparo.

Motherwell estas facile atingebla de Anglio per trajno kaj aŭtobuso kaj konvene troviĝas inter la flughavenoj glasgova kak edinburga.

La Kongreso okazos en la Bentley Hotelo, iama domego de ŝtalestro, nur 2 minutojn piede de la stacidomo. La hotelo havas bonegan reputacion pri la kuirarto skota kaj internacia kaj partoprenontoj povos komforte resti tie je modera kosto. Skotaj viskioj abundas en la baro; kaj la kongreso okazos en nova konferencejo en la hotelo kun modernaj ekipaĵoj.

La kongresa temo estos la industria historio kaj heredajo de la graflando Lanark en kiu Motherwell situas, kun specifaj aludoj al enmigrintoj kiu tiom kontribuis al la disvolviĝo de Motherwell kaj la graflando. Homoj venis el Irlando, Litovio, Italio, Ukrainio kaj aliaj landoj; kaj nun estas fortaj kontribuo de pakistananoj kaj ĉinoj. La arkitekturo elstara Heredajo-Centro apudas la kongresejon kaj estas vizitinda. Krome oni iros al loka industria muzeo kaj interesa centro kiu pritraktos la universalan temon de pilgrimado.

Estos fortaj kultura flanko dum la Kongreso: Aleksandro Danko, Ruslando/Ukrainio akordionos kaj estos muzikaj kontribuoj apartenantaj al diversaj enmigrintaj tradicioj. Espereble, la alia eksterlanda gasto estos el Niĝerio.

La prelega programo estos diversa kaj rilatas al la kongresa temo. Prelegtemoj inkluzivos: Temara Super-rigardo kaj Analizo; Keir Hardy, la unua proleta brita parlamentano, kiu naskiĝis en la urbo; la Industria Geografio de la Graflando; Rilatoj inter Skotlando kaj Italio; kaj Amuzaj Renkontiĝoj en Esperantujo.

London oni ekskursos por ekrigardi la relative nekonatan sudon de la graflando Lanark kie historio kaj pejzaĝo agrable intermiksiĝas. Vi surpriziĝos!

Homoj jam komencis aliĝi de Skotlando, Irlando, Anglio, Kimrio kaj Nederlando. Cedu al la tento: amuziĝi kaj edukiĝi pere de Esperanto!

Aperos pluaj detaloj sur la skota TTT-ejo pri la tuta Kongreso. Bonvolu rigardi!

Aliĝiloj haveblas de: La Sekretario, Esperanto-Asocio de Skotlando  
47 Airbles Crescent, Motherwell ML1 3AP, Skotlando

**Charles Dornan & David Bisset**

### Horace Barks (3) ( el prelego de W.H. Simcock)

Tre plaĉis al Horace aparte fari spritaĵojn pri instruistoj. Jen ekzemplo:

Inspektoro vizitis lernejon kaj eniris klasĉambron; li decidis testi la religian scion de la lernantoj, kaj demandis: "Kiu detruis la muregojn de Jeriko?" Nenia respondo. Do li fingromontris al knabo en la unua vico kaj ripetis: "Kiu detruis la muregojn de Jeriko?"

"N-n-n-ne estis mi, sinjoro!"

La inspektoro sin turnis al la instruistino kaj diris, "Ĉu vi aŭdis tion?" Kaj la instruistino respondis, "Jes, kaj mi povas certigi vin, ke tiu knabo estas honesta, kaj, mi firme kredas, ke ne estas li, kiu detruis ilin."

La inspektoro rapidis al la oficejo de la lernejestro kaj rakontis al li pri la afero. La lernejestro respondis, ke li bone sciis, ke tiu instruistino konas la lernantojn, kaj ke, li ankaŭ kredas, ke la knabo estas senkulpa. La inspektoro miris pri la afero kaj, je la venonta mateno, vizitis la edukad-oficejo kaj rakontis al la direktoro pri la vizito al la lernejo. "Kion vi intencas fari pri tio?" li demandis. "Ho!" respondis la direktoro, "Ne vin ĝenu pri tio – mi ordonas la konstru-fakojn rekonstrui la muregojn!" Tipa Horace Barks' ŝerco!

Vilĉjo Auld, al kiu Horace estis tre simpatia, skribis ke Horace servis kun la 5a Norda Stafordshire Regimento. Li estis dufoje vundita en Francio. Vilĉjo – kvankam li normale ne ŝatas traduki eltiraĵojn – plenigis la peton de Horaco, kiel li ĉiam nomis lin, traduki "Antaŭ Batalo" el Henrico 5a de Ŝekspiro. Vilĉjo eldonis la paroladon en La Brita Esperantisto kaj aldonis la vortojn: "La traduko estas dediĉita al la brava soldato de L'Unua Mondmilito, urbestrano, kaj ornamo de l'trinkejo 'Verda Stelo': Horace Barks".

Kiam li malsaniĝis dum la lastaj monatoj, Horaco kaj Vilĉjo korespondis. Ili surbendigis mesaĝojn. Jen estas la vortoj el la lasta de Vilĉjo. Vilĉjo parolas pri diversaj interesaj aferoj inkluzive pri siaj familio kaj antaŭuloj, pri Esperanto kiel la miraklo de la moderna mondo, kaj li ankaŭ deklamas tiun scenon el akto 4 de Henrico 5a. La eltiraĵo komencas per aludo pri la morto de Louis Beauchaire:

*"Estis kompreneble tre kamaradece peti ĉe Sankta Petro, ke li prenu vin anstataŭ nian amikon, Louis. Tamen en la pesilo de la justeco kaj la valoro, laŭ mia opinio, vi estas por esperanto almenaŭ sama valora kiel Louis. Kompreneble ankaŭ mi funebris kiam mi aŭdis pri lia tro frua morto; ankaŭ mi estas granda admiranto de liaj verkoj, kaj fakte mi elektis unu el la fabeloj de La Verda Pigo por mia Nova Krestomatio, pri kiu mi parolis antaŭ nelonge.*

*Se mi rigardas vian esperantan vivon mi trovis ĝin mirinda, mirinda. Eĉ vi instruas al mi, ĉar vi skribis al Charlie Chester (komediisto-Ed), mencianto Esperanton, pri tiu volumo de homoj en milito, kaj vi diris al mi, ke ni devas uzi tiajn rimedojn por disvasti la scion pri Esperanto. Vi tute pravas. Kaj multaj homoj kièl mi ne volonte preterantenas tiajn eblecojn.*

*Mi estas tro enfermita en miajn proprajn rondojn, ĉu ne? Kaj mi persone ne konas tre multajn eks-urbestrojn, kiuj aranĝis kursojn ĉiujare en kolegio (Barlaston-Ed), kursojn en la lokaj cirkonstancoj, havigis al vi propran trinkejon, havigis stratojn kun la nomoj 'Esperanto' kaj 'Zamenhof'; homoj, kiuj organizis tiom da internaciaj renkontigoj, ktp, ktp.*

*Mi tiel admiras vian esperantistan aktivecon, kaj mi ĉiam sentas min humila, kiam mi regardas al viaj atingoj, kaj al via kuraĝo ĝuste en niaj esperantistaj kampoj. Mi konsentas kun Sankta Petro, ke eblas ankoraŭ tro frue forpreni vin el niaj vicoj. Estis ankaŭ iom frue forpreni Louis Beaucaire kompreneble.*

*Nia nuna konversacio, ekzemple, montras la miraklon de Esperanto. Ĉu vi konstatas, ke, sen Esperanto, ni, samlandanoj tutsimple ne konus unu la alian. Ĝi estas miraklo de la moderna mondo; nome, Esperanto estas, ĉu ne? Ni havas tiom da nekredeblaj spertoj pere de Esperanto; spertoj kiujn eĉ oni ne konceptas homoj, kiuj ne estas Esperantistoj; kaj kiuj oni apenaŭ povas priskribi al neesperantistoj. Ili tutsimple ne havas la fundamentan komprenon pri kiu temas. Vi kaj mi, mi jam diris, renkontiĝis en diversaj landoj de la mondo, ĉu ne? En Grekujo, en Brazilo, ktp. Vi kaj mi renkontiĝis tie, kun centoj da homoj, kiuj ni renkontis en diversaj partoj de la mondo, kaj kun kiuj ni diskutis kaj babilaciis kaj drinkis, ktp – en tiu mirinda etoso kaj atmosfero. Mi pensas, ĉu ne, pri mia vivo kaj via vivo. Ni ambaŭ dediĉis nin al tiu movado, kaj el ĝi ni reciproke ĉerpis tiom da feliĉo kaj tiom da inspiro, ĉu ne?"*

## Ĉiutaga Esperanto

### UNIVERSALA BRUAÇADO

"La vojboriloj (*pneumatic drills*) ankoraŭ bruaĉas (*are making a row*)."

"Nu, oni riparas la ŝoseon (*roadway*) post la unundoj (*floods*)."

"Evidente. Sed kial oni ne povas inventi silentan vojborilon?"

"Ĉiam vi plendas (*you're always moaning*). La nuna vetero estas vigliga (*fresh*), kaj la ĉielo sennuba. La ruĝgorĝo (*robin*) vizitadas mian ĝardenon. Baldaŭ ni vidos la unuajn neĝborulojn (*snowdrops*), kaj kvankam ankoraŭ vintro estas, printempo venos."

"Kaj sendube nebuletoj (*mists*) leviĝos de sur la kanalo, kaj ĉiuj komencos tusi (*cough*) kaj terni (*sneeze*). Kiel kutime, la gripo (*flu*) atakos, kaj la funebralistoj (*undertakers*) gajnos multon."

"Kia pesimisto vi estas! Mi ġuas la novjaron. Je silvestra vespero (*New Years Eve*) mi gastis en belega festo (*party*). La mangajoj estis abundaj kaj la trinkajoj estis multspecaj."

"Kaj sendube ĉiu fine ebriiĝis."

"Tute ne! Kelkaj homoj drinkis, sed tio povas ĉie ajn kaj iam ajn dum la jaro. Kion vi mem faris por celebri silvestran vesperon?"

"Mi sidis antaŭ la televidilo, kaj spektis la idiotojn kiuj spektakligis sin (*making a spectacle of themselves*)."

"Vi estas nerebonigebla (*incorrigible*)."

"Oj! Jen rekomenciĝas la bruaĉado de la vojboriloj."

"Kial vi ĉesas paroli post tio? Sendube la betonmiksatoroj (*cement mixers*) bruos poste. La sono de la fajropumpiloj dum oni pumpas la inundakvon el la butikoj nepre (*are bound to*) ĝenos vin. Kaj la kamionoj kiuj venos por forporti ruinigitaj mebloj ankaŭ bruos."

"Nun vi incitetas min (*now you are winding me up*)."

"Tute ne! Mi certe ne blagas, ĉar mi diras la veron. La moderna vivado, kaj aparte en la urboj, nepre estas brua, sed tio ne signifas, ke ĝi estas bruaĉa, ĉu?"

"Ne nur en la urboj. Mi estis antaŭ ne longe en la kamparo, kaj tie la bestoj kaj birdoj komencis brui preskaŭ tuj post la leviĝo de la suno. La gebovoj (*cattle*) muĝis. La anasoj kvakis. La porkoj gruntis. La ŝafoj beis. La kaproj mekis. La hundoj bojis. La kokoj eĉ antaŭ la sunleviĝo kokerikis. La sovaĝaj birdoj formis la tagiĝan ĥoron (*dawn chorus*), por ke neniu dormu. Mi preferos resti en la urbo."

"Vi scias, kio helpus al vi, ĉu ne?"

"Ne!"

"Ia akcidento kiu surdigus vin (*would make you deaf*)."

#### NOTES.

1. *Nebuleto* is a *mist*; *nebulozo* is a *nebula*.
2. *Betonmiksatoro* has been in the language for over 30 years. See John Wells dictionary.
3. *Ripari* in Esperanto; *Repair* in English.
4. *Neĝborulo* is one of the few compound words for flora or fauna in Esperanto. The scientific term is *galanto*. Note that the European robin is a *ruĝgorĝo*, or scientifically a *rubekolo*. However, the American robin is a *migra turdo*, and the Australian one is a *ruĝkapa turdo*; two quite different birds. You have been warned.

Don Lord.

## Kial Esperanto Havas Dek Ses Regulojn.

La bone konataj dek ses bazaj reguloj de Esperanto ĉiam mirigas min. Ili estas kunmetitaj kvazaŭ hazarde. Ili estas nekompletaj kaj ne bone priskribas la lingvon. Imagu novan lingvon por kiu la unua regulo diras ke io eĉ ne ekzistas! Kiel artefarita lingvo tiel bone elpensis kiel Esperanto povus havi tiom malbone ordigitajn bazajn regulojn? Venis al mi ebla klarigo: povus esti ke Zamenhof ne multe satis regulojn kaj efektive pensis pri ili nur en la lasta momento. Nun fantazio regas miajn pensojn. La vero malpli gravas ol interesa supozo. En mia imago mi bildigas neokazintan eventon jen:

“Cu vi tralegis mian novan libron, Felikso?”

“Jes, Ludoviko, gi vere estas mirinda afero – tamen...”

“Tamen?”

“Ludoviko, via lingvo estas tiel bele elpensisita, tiel fleksebla, tiel preciza, sed samtempe tiel nuancoriĉa, ke mi ne dubas ke ĝi estos vaste akceptita tuj kiam la mondo ricevos ĝin.”

“Cu vi ne diris ‘tamen’?”

“Nu, jes – Ludoviko, ĉu vi povas fari malgrandan, etan aldonon?”

“Jes se necesas, sed la libro devas esti preta por la eldonisto morgaŭ matene. Kian aldonon vi proponas?”

“Ludoviko, vi prezontos al la mondo novan lingvon kun belaj ekzemploj de la lingvouzo, sed ...”

“Sed?”

“Ludoviko, reguloj tute mankas!”

“Kial mi bezonas regulojn?”

“Por klarigi kiel uzi la lingvon.”

“Mi jam montris kiel uzi la lingvon per miaj ekzemploj. Oni devas nur legi.”

“Sed homoj ja atendas regulojn.”

“Mi opinias ke reguloj tute ne necesas. Ili malliberigus homojn. Oni povas uzi la

lingvon laŭ nur la principoj kiujn mi montris per ekzemploj.”

“Kredu min, Ludoviko, viaj varbotoj deziras regulojn por gvidi ilin.”

“Sed reguloj devigas kaj malpermisas – tio estas tute kontraŭ la spirito de mia lingvo.”

“Ludoviko, via meno estas eksterordinara brila, sed la mezkapablaj homoj, la nepoliglotoj, vere bezonas helpilojn, lambastonojn. Vi devas doni regulojn al ili kiel gvidmapon.”

“Ĉu vi vere tiel opinias pri reguloj, Felikso?”

“Jes, vi nepre bezonas regulojn.”

“Do mi faros, sed mi devas rapido. – Kiom da reguloj vi deziras?”

“Mi ne scias. Kiom necesas?”

“Kiel mi diris, reguloj tute ne necesas, tamen estas – mi ne scias – eble du – aŭ tricent fundamentaj nocioj kaj konceptoj...”

“Ne, tro multe.”

“Mi povus resumi per eble kvindek rimarkoj.”

“Ankoraŭ tro.”

“Tridek?”

“Ankoraŭ tro.”

“Eble mi povus kombini ilin por fari ses grandegajn principojn.”

“Ŝajnas al mi ke tiom da reguloj ne estas suficiaj.”

“Kion vi opinias pri dek ses?”

“Tiu nombro estas tute kontentiga al mi.”

“Bone, estos dek ses. Mi kreos ilin ĉi vespere, antaŭ ol enlitiĝi. Mi devos rapidi, ĉar la eldonisto atendos min morgaŭ. Dankon kara Felikso, pro via helpo, kaj ĝis revido.”

Stećjo Norvell. (el *Inter Ni* n-ro 123 (julio 96)

\* \* \* \* \*

*Continued from Page 7*

I think that many people would be interested in a language that they could learn passably in a ten—or fifteen-session course. But the really exciting part would be to follow the course with a trip to visit a matched group of beginning Esperantists in Europe. Our local newspaper runs weekly bus trips to many beautiful European destinations for £79 to £99 for four days, including hotel and breakfast, so this could be inexpensive without even staying at the hosts' homes.

I'm sure 'ordinary' (i.e. not yet members of the

*continued on page 14*

## BONVOLU ESPERANTIGI

Mi ricevis ok solvojn de *Bonvolu Esperantigi* 3. Jen mia mozaiko:

“Gloria,” diris Steerpike [Stirpajk], “estas vortara vorto. Ni ĉiuj enkarceriĝas per la vortaro. Ni elektas el tiu paper-enfermita karcera niajn malliberulojn, la nigrain presitajn vortetojn, kiam verdire ni bezonas novajn sonojn eldirendajn, novajn rajtigitajn vortojn, kiuj eltirus novan efikon. Per morta kaj katenata lingvo, karulinoj miaj, vi estas ja gloria, sed ho! kia ĝojo estus doni liberon al tutnova sono kiu eble vin konvinkus pri kiel mi vere estimas vin, sidantajn tie flank-al-flanke en via purpura pompo. Sed ne, neebolas. La vivo tro hastas por onomatopeo. Mortintaj vortoj min defias. Mi povas krei nenion sonon, sinjorinoj, kiu trafas.”

“Vi povus peni,” diris Clarice [Klaris]. “Ni ne estas okupataj.”

### Notes

“We are all imprisoned in the dictionary”: English uses the passive more often than many other languages and it is frequently better to find ways of avoiding the passive in Esperanto.

“Paper-walled”: several of you chose “papermura”, which is acceptable, but to my mind the English expression has here a sense of being walled in. I have selected “paper-enfermita” (TN) which gives a non-literal equivalent.

“Fresh sounds to utter”: most of you used either “fresajn” or “novajn” for “fresh” – either would do. You came up with a variety of solutions for “to utter”: I have opted for TN’s compact “eldirendajn”.

“Enfranchised words”: “enfranchised” encompasses, I think, both “liberated” and “given proper credentials”. I am not aware of an Esperanto word which combines the two senses, and so it is necessary to make a choice. Most of you selected “liberigitajn”, some “rajtigitajn”. TN had an imaginative “elkadrigitajn”..

“To give vent”: the little word “to” carries a great deal of force here – far more than that of a mere infinitive. It conveys the sense of a desire that something could be done. Most of you succeeded in finding Esperanto expressions which reflected this. For “give vent”, one or two of you used simply the verb “eligi”, but I am not sure that this quite gives the flavour of the English, which is pretty flowery. Among other translations – all acceptable – were “doni spiron”, “doni vivon”, “aperigi” and “elbuſigi”. I have opted for CB’s “doni liberon” which picks up the metaphor of imprisonment which runs through the whole passage.

Premieto to Tom Neil.

Jen la teksto por la kvina konkursa.

## Bonvolu Esperantigi 5

The Circumlocution Office was (as everybody knows without being told) the most important Department under Government. No public business of any kind could possibly be done at any time without the acquiescence of the Circumlocution Office. Its finger was in the largest public pie, and in the smallest public tart. It was equally impossible to do the plainest right and to undo the plainest wrong without the express authority of the Circumlocution Office. If another Gunpowder Plot had been discovered half an hour before the lighting of the match, nobody would have been justified in saving the parliament until there had been half a score of boards, half a bushel of minutes, several sacks of official memoranda, and a family-vault full of ungrammatical correspondence, on the part of the Circumlocution Office.

[From *Little Dorrit* by Charles Dickens]

Translations to Michael Cayley, 13 Grove Road, East Molesey, Surrey KT8 9JS by 30 April.

\* \* \* \*

*Continued from Page 13*

Esperanto Movement!) British students would appreciate having a goal: going abroad and being able to communicate in a foreign language once they arrived. And they would get even more practice when they had their turn at hosting the European group. Wouldn’t this beat staying taking a mail-order course and dreaming vaguely of someday joining “Pasporta Servo”? This would also prove Esperanto’s utility right from the start.


By the way: I got the idea of a class trip from when I trained to be a scuba diver in Michigan (USA). Our certification classes were immediately followed by a dive trip to Florida, and if we hadn’t had this experience, I’m sure most of us Michigan divers wouldn’t have continued diving after the original course. But once we saw the fun of diving in the tropics, I’m sure that’s why many of us continued with it. (I eventually went on to dive in four countries).

\* \* \* \*

**Edith Sheldrick** enlisted the aid of a M.E.P. when she lost her handbag during a visit to the European Commission headquarters in Brussels whilst taken part in the European Esperanto Congress in Ostend last summer. It took 8 months for the handbag to be reunited with Edith back in Barnoldswick, Lancashire. Quite a lot of editorial space in the local papers resulted. What our members will do to produce publicity for Esperanto!

**Krucvort-enigmo de Sue Ralph**

(La solvo aperos en la venonta Update)

**HORIZONTAL**

- 1 Domo por birdoj. (4) (R)  
 3 Dek du coloj faras unu - - - n. (4)  
 6 Varmega stelo. (4)  
 7 Vestajo por la mano. (4) (R)  
 9 Ido de azeno kaj ĉevalino. (4)  
 11 Esprimi doloran senton per plendaj sonoj. (4)  
 12 Multvalora metalo. (2) (R)  
 14 Konjunkcio, kiu signifas 'kun la supozo, ke'. (2)  
 16 Poco. (5)  
 18 Vidigi. (4) (R)  
 19 Mara erinaco. (4) (R)  
 21 Subtera ĉambro. (3) (R)  
 22 Avenuo. (4)  
 23 Sufikso, kiu signifas instrumenton aŭ aparaton. (2)  
 24 Tri - - e dek kvin estas kvin. (2)

**VERTIKALE**

- 1 Tre malhela koloro. (4) (R)  
 2 Revo kiu okazas dum dormo. (4) (R)  
 3 Uzi cigaredon. (5)  
 4 Numero. (3)  
 5 Teksajo farita el ino. (4)  
 8 Konstruado, en kiu oni prezantas spektaklojn. (5) (R)  
 10 Muzika instrumento kun klavaroj kaj pedalaro. (5) (R)  
 13 Malgrada preĝejo. (5) (R)  
 15 Juĝa aŭ oficiala esploro. (5) (R)  
 16 Meti vestaĵojn en valizon. (4)  
 17 Longa stango el metalo laŭ kiu veturas trajnoj. (3) (R)  
 19 Prepozicio. (2)  
 20 Nedifina pronomo, kiu montras iun objekton, aferon, ideon. (2)  
 22 Membro. (2) (R)

**Solvoj ( Issue 10 )****Horizontale.**

1. Mitr 3. Atak 7. Alegr 8. Balen  
 10. Kling 12. Ism 14. Est 15. Skurgo  
 17. Re 19. Ot 20. Infer 22. Fulm  
 24. Ek 25. Ok 26. Imitis

**Verikale.**

1. Melk 2. Tibi 3. Ake 4. Tenis 5. Ag  
 6. Krem 7. Alg 9. Ankr 11. Laktuk  
 13. Streki 14. Eon 15. Sofeo 16. Gi  
 18. Er 21. Fet 23. Mi

**De Stephen K. Thompson**

Kara Stefano..... salutas vin Fred.

Kara Stefjo..... amike, Edward.  
 Kara Stećjo... ..... bondeziras Gillian.  
 Ĉu sole mi rimarkas ian nelogikan en ĉi  
 tiuj al -kaj subskriboj? Persone, mi trovas  
 tion iom strange, ke iu subskribu sin per sia propra,  
 nacilingva nomo, tamen sentas sin libera, tute ne invitite,  
sanĝi mian nomon al iu supozita internacia versio! Mi  
 certas ke nenia malgentileco estas la intenco, tamen.....

Ĉu ne tiuj, kiuj sentas la emon esperantigi nomojn, devas  
 komenci per sia propra, kaj tiel sanĝi ies alies nomoin  
 nur post invito?

Mi kontraŭas la uzadon de "Stefano" por mi persone,  
 ĉefe ĉar tiu ne estas mia nomo – eĉ ne alsonas įel kiel.  
 (Mi klarigu por eventualaj neanglalingvanoj, ke  
 "Stephen" prononciĝas "Stivn".) "Stivcjo"-n  
 miakceptus, sole de tiuj kiuj en la angla lingvo nomus  
 min "Stevey" – unu ĝis nun dum mia tuta vivo, kaj ŝi  
 eksedzigis min!

Eĉ pli gravaj problemoj pri mia dua antaŭnomo, Keith.  
 (Prononcita Ki ) Kion diable la esperantigemuloj farus  
 per tiu??!! (Kiso? Kizo? Kiĉo Lvizo? Krizo?) Sufiĉe!

Do, karaj Freĉo, Eduardo kaj Ĝilnjo, kiam mi alskribos  
 vin, mi tre feliĉe uzos iun ajn nomon, per kiu vi  
 subskribas vin; mi ĝentile petas, ke vi afable faru same,

**EAB Update**  
Downham Reach Cottage  
Nacton  
Ipswich IP10 0LA  
Gt. Britain  
  
Phone: 01473 717088  
Fax: 01473 274531  
Email: ericwalker@gn.apc.org

(all communications for the editor to his home address please)

### **ESPERANTO ASSOCIATION OF BRITAIN**

Wedgwood Memorial College,  
Barlaston, Stoke on Trent,  
ST12 9DG  
Tel: 01473 717088  
Fax: 01473 274 531  
Email: eab@esperanto.demon.co.uk

#### **NEW MEMBERS.**

Mr L.J. Lane	Bromley
Stephen Walsh	Bradford
Mr G. Wynn	Maidenhead

#### **NEW SUPPORTERS.**

Tess Burnett	Altrincham
Mick Webb	Ipswich

#### **OPEN DAY AT U.E.A.**

About twice a year U.E.A. has an open day at its head office in Rotterdam. The next one is on Saturday April 21st. Visitors get a tour of the building and various events take place throughout the day. You get a 10% discount on books that you buy and you don't have to pay any postage so you could save quite a lot of your ferry costs if you bought a lot of books. You could go on the Friday night ferry leaving Harwich at 23.15 and return on the Saturday night ferry which gets you in to Harwich at 6.30am on Sunday. If you book ahead you can get substantial reductions. Ask your local travel agent.

#### **Holiday information.**

The office has received details of holidays in Iraq from **Cleopatra Travel & Tourism C. Ltd.** The leaflet details a 10 day holiday which details visits to many famous historical sites, Babylon, Nineva, Kerbala, Ur and Bagdad. Send a stamped addressed envelope for a copy of the leaflet.

\* \* \* \*

## **In the steps of Marco Polo!**

Karaj samideanoj,  
Kunlabore kun Xi'an Filio de China Junulara Vojaĝ-agentejo, nia turisma servo okazigos vojaĝon laŭ Silka Vojo de junio ĝis septembro. Ni sendas al vi itienron (kiel aldonajo) kaj esperas vian kunlaboron en via lando. Kiel vi vidos, la prezo ja estas tre favora. La Silka Vojo ĉiam estas mistera kaj alloga al ĉiuj, vi certe legis multajn raportojn pri ĝi, speciale en pasintaj 'El Popola Ĉinio'. Ankaŭ pri la historio, do, kial ne sekvu nin al la Vojo? La vojaĝ-linio kaj prezo estas ŝanĝebla laŭ via postulo.

Turisma Servo de Zhiyuan.

ZHIYAN INTERNACIA KOMPANIO  
CN-710068 Xi'an, Chinio.  
Rel/fakso: +86-29-841-2463. et

\* \* \* \*

## **A LATE SUMMER HOLIDAY IN MALTA**

Members Jane and Brian Rayner write to tell of a very pleasant holiday to be had in Malta (the George Cross Island for those with long memories)

The Malta Esperanto Society has arranged the  
**La Oka Internacia Turisma Semajno**

Will take place 2nd to 8th September 2001.

The cost for six nights of half-board and many excursions is 145 Maltese liros (equals about £217). Leaflet available from the office. Arthur Sly ( Tel: 01462 685 055) is going and would be happy to join up with others.

\* \* \* \*

Li jam manĝis la kotleton, kiun la kelnero en la luksa resoracio rekomendis.

La kelnoro demandis al li afable: "Kiel vi trovis la kotleton, sinjoro?"

"Tre facile," li respondis, "Mi flanken metis la du pizojn, kiuj estis kun ĝi. Ĝi kuŝis sube."